Y así el Ekeko vivió fuera de la ley, expulsado pero no olvidado ni solitario, más de dos siglos. Ocurrió entonces que en los alrededores de La Paz, en 1781, el valiente indio Tupaj Katari se rebeló contra los opresores. El gobernador de la ciudad, un tal Sebastián de Segurola, durante varios meses intentó en vano sofocar la rebelión. La ciudad cercada sufrió mucho por la escasez de alimentos y las enfermedades. El gobernador pidió la ayuda de la Virgen María de La Paz y entonces los indígenas rebeldes, después de algunos meses de cerco, tuvieron que ceder, Segurola creyó que les salvó su oración. Felicísimo, lanzó gritos de alegría y disfrutó la victoria. No olvidó recompensar a su salvadora y ordenó celebrar solemnemente su día, el 24 de enero. Nuevamente hubo un festín y una solemnidad nunca antes vista. Igual que hace dos siglos, todos fueron invitados a engrandecer la fiesta con sus propias contribuciones. Los españoles nuevamente se pusieron sus sombreros de tres picos y sacaron las guitarras, mientras los indios, igual que antes, vinieron trayendo en las manos imágenes del pequeño Dios, ofreciéndoles sus objetos necesarios.

Era como si las épocas pasadas se hubiesen desempolvado de golpe. En la plaza resonaron los gritos de "¡Alasita! ¡Alasita!", que en aymara significa "compra, cómprame". Los hombres de nuevo compraron bagatelas, que deseaban tener en la vida real. La fiesta, para alegría de todos y especialmente del gobernador, pasó sin incidentes. Él estuvo tan contento, que decidió repetirla en los años posteriores, con la misma grandeza y en la misma forma. Se contentaron también los indios y astutamente aprovecharon la ocasión para retornar a la vida pública a su pretérito dios Ekeko.

Pero lo más importante fue que, en medio del entusiasmo y la alegría, nadie les preguntó acerca de la causa que cambió el aspecto del Ekeko. El gordito, que nunca había sido bello, tampoco embelleció ahora. Era el mismo de antes: gordo, nada gracioso y agachado, pero su cara recibió algunos rasgos del todo nuevos no-característicos de su raza. Las gruesas mejillas ahora fueron embellecidas por una amplia mueca de sonrisa, en vez de una sonrisa antes apenas perceptible, pues la risa es algo extraño a los indígenas, cejas gruesas, e iguales bigotes y patillas. Cambió inclusive el vestido. Su anterior vestido, con los bordes del pantalón y las mangas desgarradas, se reemplazó por uno nuevo totalmente acorde a la costumbre española.

Totalmente simple, los atentos observadores constataron que él se parecía al mismo gobernador Segurola. ¿Cómo explicar este fenómeno? ¿Se trataba de un acto de honor o una burla a Segurola? ¿Era que se esperaba del gobierno de Segurola abundancia y bienestar? ¿Se burlaban de su aspecto? ¿Era una demostración clara de que también después de siglos se guardan sus dioses antiguos y sus costumbres? Todas estas preguntas no han recibido respuestas hasta hoy día. ¿O es un secreto? Por lo demás, estos no serían los únicos secretos del alma indígena, que la imposición blanca no lograría descifrar.

El "status" del Ekeko también en la época actual no se libera de un velo de misterio y mística. Estadísticas y números sobre Bolivia dicen que es un país católico, en el cual la religión y los credos del pasado precolombino retrocedieron ante el catolicismo. Quizás sea así, pero ¿para quién producir ahora una gran industria de pequeñas bagatelas? ¿A quién venden los indios, en su feria de La Paz, cientos de esculturas del prehistórico dios? ¿Para quién se imprimen billetes en miniatura, imitaciones del dinero boliviano vigente? ¿Para los turistas? ¿Sólo para ellos ocurre también ahora la gran fiesta de "Alasita" que dura una semana y comienza el 24 de enero, exactamente al medio día, con la presencia de los más altos funcionarios del Estado? ¿Es posible que todos estos miles de personas presentes durante las fiestas del Ekeko sean solamente turistas y observadores?

No, el Ekeko no es solamente un buen dios de la vieja mitología lírica sobre quien las viejas abuelas cuentan a sus nietos. Él es un espíritu viviente del pueblo. Él perdura también hoy, quizá no como ciego credo como alguna vez, pero todavía siempre como irremplazable rayo de esperanza sobre un futuro

mejor y la creencia en un mejor mañana. Los regalos que actualmente recibe no son sólo lágrimas, patatas, miniaturas de arcilla. Actualmente, ahí uno encuentra inclusive pequeños camiones, atractivos televisores, lujosas casas... Y hasta se dice que en algunos lugares, se puede comprar también terrenos, predios, todo en pequeñas miniaturas...

El Ekeko evidentemente vive hoy a través de la vida de su pueblo. Él le sigue en sus deseos y fantasías. Si no fuese así, ya hace tiempo que se habría extinguido su mito. Éste habría desaparecido como su pequeña y frustrada esposa, a quien se la quiso imponer en cierto tiempo. ¡Digna de compasión, ella de verdad sólo permanece como una creación artificial, frente al otro, viviente y firmemente enraizado en la creencia! Ella no logró pervivir junto a su primitivo esposo y ni siquiera la leyenda la advierte. Ella simplemente desapareció. Quedó solamente el Ekeko, dios pequeño y contento de sí mismo desde el pasado. Quedó para dar testimonio de la duración de su pueblo y de su raza. Por su insistente duración él mereció crecer por lo menos una vez algo más de un pie, en su larga y tormentosa vida. En 1972 se levantó un monumento al Ekeko en la plaza Pérez Velasco en La Paz. También esta vez él está supercargado de bagatelas y feo, pero grande. También en esta ocasión el eterno y contento bondadodo no se entristece, de que por grandeza y belleza, le ensombrezca la contigua basílica de San Francisco. El observa alegremente a los transeúntes y al parecer quiere recordarles que esta cotidianidad divina es el entrelazamiento de dos mundos y culturas que, he aquí, encontraron el camino y la manera de coexistir uno junto al otro...

-----  
Traducido de la versión en esperanto al español, por J. R. Arze.

\* \* \*

- 
1. *Ekeko* (aymara): pequeño dios en la etnia aymara. *J.R.A.*
  2. Diversos nombres del Ekeko. *J. R. A.*
  3. *Taunqap* (o Thunupa), *Pachamamak* (o Pachamama), nombres de dioses y/o seres sagrados de los indígenas. *J. R. A.*

JUDITA REY HUDEĈEK

### RAKONTO PRI EKEKO<sup>1</sup>

Ĉu vi iam tenis iun Dion en via mano? Ne? Mi jes. Mi ne ŝercas. Li staris sur mia manplato kun ĉiuj dek centimetroj de sia alteco. Ofte mi renkontadis lin eĉ pli malgranda. Foje li ne estis pli granda ol ungo. Tiel eta kaj diketa ĝi ŝajnis unuavide pli ridiga ol potenca. Nur poste kiam ni pli interkonatiĝis, mi komprenis ke li estas pli forta ol Zeŭso aŭ Jupitero. Senkonsidere pri la alteco, li estas bravulo malfacile komparebla. Li estas la venkinto de jarcentaj bataloj kaj kredoj de rasoj. Ĉar kie estas hodiaŭ Zeŭso kaj Jupitero? Ili ne ekzistas, Malplenaj vakas iliaj belaj palacoj kaj tiu ĉi eta kaj modestaspekta senhejmulo kiu neniam posedis iun palacon, fieras tra la vasto de regionoj en Bolivio. Vi povas lin ĉie renkonti. En luksaj oraĵejoj de la plej alte situanta monda metroplo, sed ankaŭ sur improvizitaj vendotabloj de lokaj foirejoj ĉirkaŭ la lago Titikako. Kiam li estas orumita, li pendas sur koloj de junaj bolivianoj, sed li pavumas ankaŭ modlita el gipso en modestaj kabanetoj de indiĝenoj. Eta kaj nealtrudiĝema, li ĉie ĉeestas.—

Iame oni lin persekutis per glavo kaj kruco, per predikoj. Vane. Nur dum certa epoko li iom kaŝiĝis, eĉ ŝajnis dum kelkaj jarcentoj, ke li malaperis. Longe li forestadis, kaj tiam subite denove revenis same gaja kaj bonhumora kiel antaŭe. Oni povus ekpensi, ke intertempe nenio okazis pri li. Eble eĉ ne okazis io sufiĉe forta por lin forskui. Ĉar per sia reveno li pruvis, ke la spirito de lia popolo kaj obstino de lia raso estas pli forta ol oni povus konjekti.

Kiu fakte estas Ekeko, tiu eta diketa dio pri kiu la nuntempa scienco komencis okupiĝi nur en 1961, kiam estis pritraktitaj amuletoj kaj talismanoj de la norda departamento de La Paz?

Se la konkerantoj atingintaj la grundon de la hodiaŭa Bolivio en la jaro 1535 ne senkompate estus detruintaj ĉion kio memorigis pri la mirinda mondo de la imperio de Inkaoj, historiistoj, etnologoj, arkeologoj kaj aliaj fakuloj verŝajne hodiaŭ povus doni decidan respondon pri tiu demando. Ili povus kun certeco pritaksi ĉu pravas tiuj kiuj asertas, ke en la kazo "Ekeko" temas pri vera historia persono, pri iu konata

herbkuracisto, magiisto aŭ profeto el la gento *Callawaya* de la antikva popolo Aymar[a], kiu jam la alvenon de Inkaoj atendis kun riĉa tradicio kaj pompeksa kulturo, aŭ ĉu pravas tiuj, kiuj la fonton de la tuta rakonto serĉas en simpla infana ludilo-pupo.

Mirinde, sed vere: la genie organizita imperio de Inkaoj, kiu tre precize administris ĉion, kio en ĝi okazadis, tute ne posedis sian skribmanieron. Ĉio estis notita per speciale kunligitaj ŝnuretoj, *kipusoj*, kaj ne per literoj. La lingvoj de indiĝenoj tiam, same kiel hodiaŭ, ne estis ortografie oridigitaj ĉar ili ne estis skribitaj. Pro tio ne eblas kun certeco diri ĉu Ekeko iam nomiĝis Kiko, Keko, Ecaco, Ekhakho aŭ Kon<sup>2</sup>, samkiel ne eblas scii ĉu la dioj de Taunqap, Pachamamak<sup>3</sup> kaj li estas identaj personoj. Sed ĉio supozigas, ke li devenas en la regiono Carva, kies centro estas en Charasani, kvankam lia influo transpaŝis la limojn de lia hejmgregiono. La homoj el tiu regiono estis de antikvaj tempoj konataj herbkuracistoj, kiu por kuracado uzis pli ol 200 herbojn. El tiuj kreskaĵoj ili kapablis elstringi kuracilon por korpaj malsanoj sed ankaŭ fari el ligno etajn triangulajn amuletojn, servintaj kiel helpiloj al animo kaj korpo.

Unu el tiuj popularaj kuracistoj, laŭ la legendo, estis aparte lerta. Li famiĝis per iuj mirakloj ligitaj al fajro. Pro tio li ne estis nur simpla herbkuracisto sed ankaŭ magiisto kaj profeto de sia popolo. Kiam li malaperis en la vera vivo liaj samgentanoj klopodis lin reteni en la formo de diketa idoleto. Li estis etstatura kaj laŭaspekte neimpona sed li fariĝis granda en la postlasitaj spuroj. La ĝibo kiun havas la hodiaŭa idoleto, devenis\*, laŭ iuj opinioj, de misformiĝo de la spino de la vera Ekeko, kiu eble estis kaŭzita pro ftizo. Ĉar indiĝenoj ne intencis lin plibeligi en siaj memoroj, oni lasis al li ankaŭ la ĝibon.

Tiu ĉi versio de la legendo pri Ekeko ne estas malpli kredinda ol la alia, kiu asertas ke "lia Dia Moŝteto" komence estis nur eta infana ludilo-pupo. La dua rakonto ŝajnas eĉ pli logika kaj pli detaloriĉa. Laŭ tiu rakonto la eterna akompananto de infanoj –la pupo–, per siaj bonkora aspekto, gaja etoso kaj diketaj ridentaj vangoj iom post iom ekkonkeris ankaŭ la korojn de plenkreskuloj. La bonkora, kvazaŭ nano elradius gajon kaj bonhumoron. Li fariĝis la ŝatato de la indianaj familioj multe pli frue antaŭ ol la blankuloj detruos la idilan trankvilon de ilia vivo. En la regiono ĉirkaŭ la lago Titikako, kie la tero, la akvo kaj la ĉielo estas saturitaj per la rakontoj pri mitaj estaĵoj kaj dioj, ne estis malfacile al tiu ĉi dorlotito elbatali la rajton pri la honora loko en la familio.–

De tiu honora loko en la domo ĝis iuspeca altaro –kvazaŭ eta santejo–, ne plu longis vojo. Kaj kiam iu jam ekloĝas sur la altaro kaj ĝuas dorlotaĵojn de familianoj, tiu rapide povas ekpufiĝi, kredigi pri si pli ol li estas kaj eĉ imagi, ke li estas superpotenta estaĵo –dio. Siajn ŝatantojn li neniam tedis per specialaj postuloj kaj neeblaj taskoj. Li ĉiam estis kontenta kaj feliĉa. Sufiĉis alrigardi lin por gajni optimisieron. Certas ke la eta hejma dio, kiu postulas nenion kaj donas multon, estas la vera fonto de feliĉo kaj bonfarto de la hemoj, idianoj klopodis eĉ pli plaĉigi sin al li. Oni komencis al li alportadi donacojn.

Baldaŭ Ekeko fariĝis ĉirkaŭita per potetoj, vestoj, piedvestoj, per terpomaj saketoj kaj fruktkorboj... Ekŝajnis kvazaŭ kreskuloj infaniĝus aŭ ludus. Ĉar ĉiuj donacoj estis tiom etaj kaj malgrandaj, ke ili vere similis al ludiloj. "La donacoj estas dediĉitaj al la eta Dio Ekeko kaj ili devas esti konformaj al lia grandeco, por ke ili povu ilin uzi". Ili estis forte konvinkitaj, ke Ekeko repagis la donacojn per la samaj aĵoj en ties homa grandeco. Kaj ĉar homoj ĉiam bezonis multajn aĵojn oni ekkonstruis verajn dommastrumejojn kun ĉiuj necesaj aĵoj. Nenio estis forgesita, eĉ ne lamaoj, fruktoj, laboriloj.–

La dommastrumejoj montris signojn de progreso, foje abunde troviĝis bonaĵoj. Ĉu tio ne estis la plej bona signo, ke Ekeko ne estas ŝuldanto? Verŝajne estis tiel, ĉar kiel alimaniere klarigi la kreskon de lia gloro kaj estimo? Li estis estimita kaj adorita. La dommastroj turnadis sin al li por certigi pli bonan staton de siaj hejmoj. Virinoj donacadis al li lanon, manĝon, kuracilojn, petante pri sano, paco, bonfarto en la hejmo. Gejunuloj silente malkaŝis al li siajn amdezirojn. La gaja dikulo neniun rifuzis. Li ne vane estis la Dio de abundo, fekundo, vivĝojo... –

Sed jen miraklo: ju pli kreskis lia famo des pli malkreskis lia staturo. Anstataŭ konstrui por li monumentojn kaj templojn altajn ĝis la ĉielo la indianoj faris Ekekon ĉiam pli malgranda. Tiamaniere li ĉiam povis esti ĉemane. Ĉu elfarita el argilo, ligno, ŝtono, oro aŭ arĝento li neniam estis pli granda ol la etendita interspaco inter la dikfingro kaj la polekso. Ju pli malgranda li estis des pli facile portebla. Fine li fariĝis tiel

malgranda, ke la knabinoj enplektadis lin al la finplektaĵoj de siaj haroj. Li povis ĉiam esti apud ili, protekti ilin de malbono.

Sed kia Dio li estus, se li ne havus siajn grandajn festojn? Kaj kiam pli bone prifesti la Dion de abundo kaj bonfarto ol dum la tempo de rikolto? En tiu tempo de abundo oni eĉ fiksis por li la tagon, kiam ĉiuj aparte klopodis lin plezurigi kaj ĝojigi. Li ricevis abundoplenon da etaj donacoj. Eĉ ekzistis danĝero ke ili sufoku lin. Kiam ne plu estis loko sur liaj etenditaj manoj kaj sur lia ĝibo, oni komencis pridonaci lin ankaŭ por lamagregoj, kiuj helpu al ili porti donacojn. Ĉiuj ellaboris tion, kion ili kapablis. Potfaristoj faris por li la plej delikatan etan vazaron, ŝuistoj ŝuetojn, tekstistinoj la plej ŝajnan teksaĵon... Sed ili ĉiuj bezonis ankaŭ tion kion ili mem ne povis fari. Ili komencis tial reciproke interŝanĝi etajn varojn. Unue interŝanĝis, poste ankaŭ aĉeti. La festoj de Ekeko transformiĝis al veraj foirejoj de etaĵoj. Oni vendadis grandkvante, ĉar deziroj estis multnombraj.

Plej bela estis en la festo tio, ke ĉiuj estis samŝancaj por esprimi siajn dezirojn al Ekeko. Eĉ tiuj mallertuloj kiuj solaj kapablis nenion fari, aŭ tiuj malriĉaj tiom, ke ili ne povis aĉeti etajn aĵojn por pridonaci lin – havis ankoraŭ unu ŝancon. Ankaŭ ili povis riĉiĝi, se ili estus foririntaj al la monto por tie koleki apartajn ŝtonetojn diversforajn kaj nekutimkolorajn. En la tago de la festoj de Ekeko oni povis tiujn, aliel sensignifajn ŝtonojn, ŝanĝi al dezirataj objektoj donacotaj al Ekeko. La vendistoj kompreneble sciis, ke ili malgajnas ĉar jam la sevontan tagon post la festo ili retenis nenion el sia magia valoro, sed ne ekzistis homo kiu kuraĝus rezigni pri tiu ĉi komerco. Ekeko ja estis bona dio, sed ĉi tia ago – eble kolerigus lin.

Poste, anstataŭ ŝtonetoj oni komencis uzi butonojn. Unue simplajn kaj poste brilajn. Kaj kiam multe pli poste ili interkonatiĝis kun la mono kaj ĝia funkcio, ili komencis faradi malgrandajn monformaĵojn...

Riĉigante la indianojn ankaŭ Ekeko mem fariĝis ĉiam pli riĉa kaj kontenta. Nenio mankis al li. Li ricevadis ĉion. Ĉion krom la alteco, sed la malalta staturo evidente ne prezentis por li problemojn. Li restis fidela kaj bona amiko al homoj kaj por plene feliĉigi ilin, li ĉiam pli okupiĝis ankaŭ pri la plej delikataj demandoj – demandoj de la koro kaj sentoj. Metita sur apartan lokon en domo li servis kiel konfesprenanto kaj konfidanto de gejunuloj kaj geamantoj. Li aŭskultis iliajn amĉagrenojn kaj akceptis la taskon prizorgi ke la amimplikaĵoj feliĉe kaj bone dissolviĝu.–

Sed ĝuste la enplektiĝo de Ekeko en ĉi tiajn agadojn kaj ĝenerala emo al la ĉi-teraj plezuroj preskaŭ detruis lin. Ĉar en la komenca periodo de la hispana invado en Sudamerikon, ili ne tuj rekonis en la ŝarĝita dikuleto lascivulon. Eĉ pli, la legendo diras ke li persone tute leĝe kaj sufiĉe gaje partoprenis en la ĝojo okaze de la fondĝo de la urbo La Paz, la 20<sup>an</sup> de oktobro 1548. Nome post la alveno al la Inkaa Imperio la konkerantoj grave interkverolis. Kiam post certa tempo kaj kelkaj bataloj ili repaciĝis kaj unuiĝis en la loko Laja, ne malproksime de la nuna La Paz, la 20<sup>an</sup> de oktobro ili decidis fondi urbon kies nomo La Paz -paco, daŭre memorigas pri lia interpaciĝo.–

Tiun ĉi gravan okazaĵon oni ja devis digne prifesti kaj ili invitis ĉiujn ĉirkaŭajn loĝantojn, hispanojn kaj indianojn kontribui al la festo. La hispanoj venis, laŭ sia kutimo, kun la trikornaj ĉapetoj kaj gitarmuziko. Kaj la indianoj eluzis ĉi tiun okazon por prifesti sian dion de abundo kaj plezura vivo, Ekeko. Ili aperis portante malgrandajn skulptaĵetojn de la diketa homido kun ĉiuj liaj bezonaĵoj.

De tiam Ekeko vivis, dika kaj kontenta, en la najbareco kun la fastmaldikaj malĝojvizaĝaj figuroj de kristanaj sanktuloj, eĉ preskaŭ oni devigis lin mem aliĝi al tiu societo. Ĉar iuj inventemaj pastroj donis al li elementojn de kristanismo: krucon kaj Biblion. Eble oni estus proklamintaj lin apostolo aŭ almenaŭ profeto, se lian kristanan karieron ne estus fuŝinta iu moralisma kaj purisma episkopo. La ĝojan kaj senzorgan vivon tiu ja iel pardonus\* al Ekeko, sed la aktivecon en la amaj aferoj li neniel povis.

Nome, la konsciplena spiritulo komprenis ke la junaj indianoj ne akceptas la novan kredon per la plena koro. Ĉiujare, kiam oni arigis je la festotago de la urba sanktulo, ili venis en la improvizitajn didomojn (la veraj preĝejoj ankoraŭ ne ekzistis), sed ŝajne ili ne aŭskultis la vortojn pri la sankteco kaj virto, kiujn al ili direktis la episkopo, sed ili atendis la krepuskon. Ĉar tiam, dum la vesperiĝo, kiam la ĝenerala festo kaj bruado ekmalfortiĝas, Ekeko plenumadis la aŭditajn deziroj de multaj junaj enamiĝintoj. Multaj impertinentaj junuloj eluzis la malatentecon de la familio kaj ŝtelis junulinojn pretajn por edziniĝo. La



ŝtelistinoj, ŝajne ne tro rezistis. Ili pasigis la nokton kun la "ŝtelintoj", kaj morgaŭ ili venis kune al la gepatroj por interparoli detalojn rilate la nuptofeston kaj la estontan komunan vivon. Ĉu necesas aparte akcenti tion ke ĉi tiuj "ŝteloj" estis nek por la junuloj, nek por la junulinoj, nek por Ekeko iu surprizo? Estas ja pli kredeble ke temis pri sucese efektivigita ideo de ĉiuj tiuj tri petolaj konspirantoj.

Ekeko, sekve, ne nur fortunis la junularon de vera kredo kaj fasta vivo, sed li eĉ publike instigis la lascivan vivon. "Liaj festoj prezentas la plej senhontan ekzemplon de malĉasteco kaj herezeco", ektondris de sur sia improvizita altaro la antaŭe menciita episkopo. Post ĉi tiuj akraj admonoj ŝajnis ke Ekeko estos kondamnita kaj ke li devos pereji. Sendiskute li devis forlasi la publikan vivon. Li malaperis de sur gajaj placoj kaj festenoj kiujn li tiom ŝategis, sed ne el modestaj hejmoj de indianoj. Junaj kaj kristanigitaj knabinoj post novaj kaj por ili nekompreneblaj ceremonioj rapidis same kiel antaŭe hejmen por denove sekrete kaj en sekureco de la propra domo konfesi siajn sekretojn al Ekeko. Ili diskutis kun li, konfidis al li kaj preĝis: Ho bona Ekeko, donacu al mi edzon! Alkonduku mian viron!

Kaj tiel Ekeko vivis neleĝe, forpelita sed ne forgesita kaj soleca, pli ol du jarcentojn. Okazis tiam, ke en la ĉirkaŭaĵo de La Paz en 1781<sup>a</sup> jaro la kuraĝa indiano *Tupaj Katari* ekribelis kontraŭ la subjugantoj. La urba guberniestro, iu Sebastián de Segurola, dum pluraj monatoj vane provis detruigi la ribelon. La ĉirkaŭita urbo suferis tre pro la nutromanko, malsano. La guberniestro petis helpon de la Madono María de La Paz kaj kiam la indiĝenaj ribelantoj post kelkaj monatoj de sieĝado tamen devis cedi, Segurola kredis ke savis ilin lia preĝo. Feliĉega li jubilis kajĝuis la venkon. Li ne forgesis rekompensi sian savinton kaj ordonis ŝian tagon, la 24<sup>an</sup> de januaro, solene prifesti. Denove okazis festeno kaj solenado neniam antaŭe vidita. Same kiel antaŭ pli ol du jarcentoj, ĉiuj estis invititaj grandiozigi la feston per la propraj kontribuoj. La hispanoj denove surmetis tripintajn ĉapelojn kaj eltiris gitarojn dum la indianoj same kiel antaŭe venis portante en la manoj figuretojn de la eta Dio ofertante liajn bezonaĵojn.

-----

La pasintaj eraoj estis kvazaŭ elviŝitaj dum unu sola tago. Sur la placo eĥis krioj "*Alasita! Alasita!*", kio en la ajmara lingvo signifas "aĉetu, aĉetu". Kaj la homoj denove aĉetadis bagatelaĵojn kiujn ili deziri havi en la reala vivo. La festo je la kontento de ĉiuj, speciale tiu de la guberniestro, pasis sen incidentoj. Li estis tiom kontenta, ke li decidis ĝin ripeti en ĉiuj postaj jaroj samgrande kaj sammaniere. Kontentis ankaŭ la indianoj, kaj ruze eluzis la okazon revenigi en la publikan vivon sian pradion Ekekon.

Sed kio estis eĉ pli grava, en la entuziasmejo kaj ĝojego neniu demandis ilin pri la ŝanĝokaŭzo de la aspekto de Ekeko. La eta dikulo, kiu ja neniam estis bela, ankaŭ nun ne plibeliĝis. Li estis sama kiel antaŭe, dika, plumpa kaj klinita, sed lia vizaĝo ricevis iujn tute novajn mienelementojn nekarakterizajn por lia raso. La dikajn vangojn nun beligis larĝa ridgrimaco, anstataŭ la iama ampenaŭ rimarkebla rideto, ĉar la ridego estas strangaĵo por la indianoj, dikaj brovoj, lipharoj kaj orelharoj same. Li ŝanĝis eĉ la vestaĵon. Sian antaŭan vestaĵon kun distranĉitaj pantalonrandoj kaj manikoj li anstatŭis per nova, tute hispankutima.

Tutsimple, atentaj observantoj konstatis, ke li similis al la guberniestro Segurola mem. Kiel klarigi tiun ĉi fenomenon? Ĉu temas pri honorigo aŭ primoko de Segurola? Ĉu temas pri tio, ke nun oni atendas de la rego de Segurola abundon kaj bonstaton? Ĉu oni mokas pri lia aspekto? Ĉu temas pri klara demonstro ke ankaŭ post jarcentoj oni gardas siajn pradiojn kaj morojn? Ĉiuj tiuj demandoj ĝis hodiaŭ ne ricevis respondojn. Aŭ ĝi estas sekreto? Cetere, tio ne estus la nuraj sekretoj de la indiana animo kiujn la blanka altrudiĝinto neniam sukcesus deĉifri.

-----

La statuso de Ekeko ankaŭ nuntempe ne liberiĝis de la vualo de mistereco kaj mistiko. Statistikoj kaj nombroj pri Bolivio diras ke tio estas katolika lando en kiu la religioj kaj kredoj de la antaŭkolumba tempo retiriĝis de antaŭ la katolikismo. Eble estas tiel, sed por kiu produktadas nuntempa industriigo de etbagateloj? Al kiu la indianoj dum sia foiro en La Paz vendas centojn da skulptaĵoj pri la pradio? Por kiu oni presas miniaturajn monerojn, imitaĵojn de la valida bolivia mono? Por turistoj? Ĉu nur por li okazas ankaŭ nuntempe la granda festo "Alasita" daŭranta unu semajnon kaj komenciĝanta la 24<sup>an</sup> de januaro,

akurate je tagmezo, kun la ĉeesto de la plej altrangaj ŝtataj funkciuloj? Ĉu estas eble ke ĉiuj tiuj ĉeestantaj miloj dum la Ekeko festoj estas nur turistoj kaj observantoj?

Ne, Ekeko ne estas nur bona dio el malnova ŝtoniĝinta mitologio pri kiu maljunaj avinoj rakontadas al siaj nepoj. Li estas vivanta spirito de la popolo. Li daŭras ankaŭ hodiaŭ, eble ne kiel blinda kredo kiel iam, sed ankoraŭ ĉiam kiel neanstataŭigebla radio de espero pri pli bona estonto kaj kredo je pli bona morgaŭo. La donacoj kiujn li nune ricevas ne estas nur larmoj, terpomsakoj, argilaj miniaturoj. Nun tie oni trovas eĉ malgrandajn kamionojn, allogajn televidilojn, luksajn domojn... Eĉ oni diras, ke en kelkaj lokoj oni povas aĉeti ankaŭ domterenojn, terpecojn, ĉion minature etan...

Ekeko evidente vivas en tiu ĉi tempo per la vivo de sia popolo. Ĝin li sekvas rilate ties dezirojn kaj fantaziojn. Se ne estus tiel jam de longe estingiĝus la mito pri li. Ĝi malaperus same kiel lia eta nedestinita edzino, kiun oni volis trudi al li en certa tempo. Kompatindulino, ŝi ja restis nur artefarita, senviva kreaĵo, krempfita al vivanta kaj firme enradikiĝinta en la kredon! Ŝi ne sukcesis pluekzisti apud sia praa edzo eĉ ne tiom ke la legendo notu ŝin. Ŝi simple malaperis. Restis nur Ekeko, eta kaj memkontenta dio el la pasinteco. Li restis por atesti pri la daŭro de sia popolo kaj raso. Per sia insista daŭro li meritis kreski almenaŭ unufoje en sia longa kaj ŝtorma vivo pli ol unu futo. En 1972 oni starigis sur la placo Pérez Velasco en La Paz, monumenton de Ekeko. Ankaŭ ĉi-foje li estas troŝarĝita per bagatelaĵoj kaj malbelulo – sed granda. Ankaŭ ĉi-foje la eterna bonulo kaj kontentulo ne malĝojas, ke per la granda kaj beleco ombrigas lin la apuda baziliko de Sankta Francisko. Li gaje observas preterpasantojn kaj ŝajne volas memori ilin, ke tiu ĉi dia ĉiutageco estas la interplektiĝo de du mondoj kaj kulturoj kiuj, jen, trovis la vojon kaj manieron kunezisti unu apud la alia...

El serbo-kroata esperantigis Spomenka  
Štimec kaj Zlatko Tišijar.  
J. Hudeček. *Priĉa o Ekeku. Rakonto pri  
ekeko*. Zagreb: 1984. 19 p.

\* \* \*

1. *Ekeko* (ajmare): malgranda diulo de la ajmara etnio. JRA.
2. Diversaj nomoj de Ekeko. JRA.
3. *Taunqap* (aŭ Thunupa), *Pachamamak* (aŭ Pachamama, pron. Paĉamama), nomoj de diaj kaj/aŭ sanktaj estuloj de indiĝenoj. JRA.

## BIOGRAFIOJ—ALFABETO GLOSARO

### BIOGRAFIOJ

**AGUIRRE, Nataniel** (1843-1888). Romanisto kaj politikisto; n. en Cochabamba kaj m. en Montevideo (Urugvajo). Elstara verkisto de la romantikisma epoko de la bolivia literaturo, oratoro kaj ideologo de liberalismo. Lia plej fama verko estas la romano *Juan de la Rosa* (Johano de Rozino) (1885). Verkis ankaŭ rakontojn, dramojn, poeziojn, ktp.

**ALCÓCER HURTADO, Enrique** ("Waskar Nina Nina" aŭ "Vaskar Fajro") (1923- ). Ĵurnalisto, pionira esperantisto; n. en Sucre; loĝis dum longa tempo en Oruro, kie impulsis movandon kaj instruadon de Esperanto. Redaktoro de *Bolivia Revuo* (1948-50). Poste elmigris al Argentino.

**ALFARO, Oscar** (1921-1963). Poeto kaj rakontisto; n. en Tarija kaj m. en La Paz. Elstaris per liaj poemoj kaj rakontoj por infanoj. Militis en la Maldekstra Revolucia Partio (PIR) kaj la Komunisma Partio de Bolivio (PCB). Ĉefaj verkoj: *Cien poemas para niños* (Cent poemoj por infanoj) (1955); *La escuela de fiesta* (La lernejo en festo) (1963); *Cuentos chapacos* (Ĉapakaj rakontoj) (1964), ktp.

**ARGUEDAS, Alcides** (1879-1946). Historiisto, romanismo, sociologo; n. kaj m. en La Paz. Pioniro de la indiĝenisma romanaro. Enagadis ankaŭ en politiko, kiel diplomato kaj estro de la Liberala Partio. Ĉefaj

verkoj: *Pueblo enfermo* (Malsana popolo) (1909); *Raza de bronce* (Raso el bronzo), romano (19\_\_); *Historia de Bolivia* (Historio de Bolivio), 6 vol. (1920-26).

**ARZE, José Antonio** (1904-1955). Sociologo, politikisto kaj pensisto; n. kaj m. en Cochabamba. La plej stara reprezentanto de marksismo kaj maldekstra movado en Bolivio. Pionira esperantisto. Ĉefaj verkoj: *Hacia la unidad de las izquierdas bolivianas* (Al la unuiĝo de bolivaj maldekstroj) (1939); *Bolivia bajo el terrorismo nazifascista* (Bolivio sub la nazifasĉisma teruro) (1945); *Sociología marxista* (Marksisma sociologio) (1963); *Bosquejo sociodialéctico de la historia de Bolivia* (Socidialektika skizo pri bolivia historio) (1978); *Polémica sobre marxismo* (Polemiko pri marksismo) (1980); *Escritos literarios* (Literatura verkaro) (1981), *La autonomía universitaria* (La universitata autonomeco) (1989), k. a.

**BOLIVAR, Simón** (1783-1830). Sudamerika Liberiginto; n. en Caracas (Venezuelo) kaj m. en Santa Marta (Kolombio). Kondukis la liberigintan militon kontraŭ la hispana koloniismo, en la norda kaj centra regiono de Sudameriko, organizis la novajn ŝtatojn, kaj desegnis la trajtojn de la liberiginta doktrino de la Nova Mondo. Prezidanto de Kolombio, Peruo kaj Bolivio; impulsanto de la kontinenta unuiĝo (ĉefe per la Kongreso de Panamo). Verkoj: *Obras completas* (Plena verkaro) (Habana: 1947. 2 v.).

**CANELAS, Demetrio** (1879-1964). Ĵurnalisto kaj politikisto; n. kaj m. en Cochabamba. Alta komitatano de Partido Republicano Genuino (Legitima Respublika Partio). Fondinto kaj ĉefredaktoro de la ĵurnaloj *La Patria* (La Patrio) en Oruro, kaj *Los tiempos* (La Tempo) en Cochabamba. Kulturis sukcese la romanon, per *Agua estancadas* (Stagnitaj Akvoj) (1911).

**CARDONA TORRICO, Alcira** (1926-2003). Poetino; n. en Oruro kaj m. en La Paz. Membrino de la dua generacio de Gesta Bárbara (Barbara Heroaro). Ĉefaj verkoj: *Rayo y simiente* (Fulmo kaj semo) (1961); *Tormenta en el Ande* (Ŝtormo en Ando) (1967); *Letanía de las moscas* (Litania de muŝoj) (1985), k. a.

**DIEZ DE MEDINA, Fernando** (1908-1990). Eseisto; n. kaj m. en La Paz. Aŭtoro de pli ol dudek verkojn: *Franz Tamayo* (1942); *Thunupa* (1947); *Literatura boliviana* (Bolivia literaturo) (1953); *Ollanta, el jefe kolla* (Ollanta, estro) (1960); *El general del pueblo* (Generalo de la popolo; biografio de R. Barrientos Ortuño) (1972); k. a.

**ESPINOZA ALIAGA, Rodolfo** (1920?- ). Advokato, ĵurnalisto, bibliografo; n. en Oruro. Pionira esperantisto en Bolivio. Unu el la ĉefaj subtenantoj de Esperanto-movado en Oruro. Aŭtoro de pluraj artikoloj kaj broŝuroj pri diversaj temoj.

**FLORES, Genaro** (1942- ). Kamparana kaj indiĝena ajmara kondukisto; n. en Antipampa (La Paz). Fondis la Indiĝena Movado Tupaj Katari.

**HUDEĈEK, Judita Rey**. Elstara kroata esperantistino; edziniĝinta kun la boliviano David Rey. Membrino de estraro de internacia esperanto-movado. Post sia vizito al Bolivio, priskribis per artikoloj diversajn aspektojn de la bolivia kulturo. Verko: *Rakonto pri Ekeko* (1985).

**LOZA, José Manuel** (1861-1862). Dulingva poeto; n. en Copacabana (La Paz). Unu el la malmultaj bolivaj latinistoj. Verkoj: *Opúsculos poético-latinos* (Latin-poeziaj verketoj) (1850); *La mujer en sus relaciones domésticas y sociales*, k. a.

**MAROF, Tristán**.— Pseud. de Gustavo Adolfo NAVARRO (v.).

**MEDINACELI, Carlos** (1898-1949). Verkisto; n. en Sucre kaj m. en La Paz. Unu el la ĉefaj eseistoj kaj romanistoj de Bolivio kaj ideologo de la literatura indianismo. Ĉefaj verkoj: *Estudios críticos* (Kritikaj studoj) (1938); *La chaskañawi* (La Krispokululino) (1947); *Diálogos y cuentos de mi paisaje* (Dialogoj kaj rakontoj de mia pejzaĝo) (1963), k. a.

**MEDINACELI, Gustavo** (1923-1957). Poeto; n. en Potosí kaj m. en La Paz. Pioniro de la surrealistma movado en Bolivio; naskiginto kaj animiganto de la 2<sup>a</sup> generacion de la grupo Gesta Bárbara (Barabara

heroaro). Verkoj: *Polícromas* (Multkoloraĵoj) (1944); *Cuando su voz me dolía* (Kiam ŝia voĉo doloris min) (1958).

**MENDIZÁBAL CAMACHO, Carlos.** Poeto kaj ĵurnalisto; n. en Oruro. Aŭtoro de: *Oruro en la sangre* (Oruro en la sango), poemo (1944).

**MENDIZÁBAL SANTA CRUZ, Luis** (1907-1946). Poeto kaj ĵurnalisto; n. en Oruro; memmortis en La Paz. Laboradis en *La Patria* (La patrio) kaj *Noticias* (Noticoj) de Oruro, kaj *El Diario* (Ĵurnalo) y *La Noche* (La Nokto), de La Paz. Verkoj: *Surcos del Sol* (Sulkoj de la Suno) (1930) kaj *Llamarada* (Flumego) (1937).

**MOLINA, Osvaldo** (1870-1925). Ĵurnalisto; n. kaj m. en Sucre. Militis en la Liberala Partio. Kunlaboranto de *La Revista de Bolivia* (Bolivia Revuo). Kulturadis rakonton kaj literaturan kritikon. Lia verkaro estas ankoraŭ disigita.

**NAVARRO, Gustavo Adolfo** ("Tristán Marof") (1898-1980). Verkisto kaj politikisto; n. en Sucre kaj m. en Santa Cruz. Kondukisto de trotskisma gruparo en Bolivio. Aŭtoro de multaj verkoj, inter ili: la eseoj *La tragedia del altiplano* (La tragedio de la altebenaĵo) (1934); *La verdad socialista em Bolivia* (La socialisma vero en Bolivio) (1938); *Ensayos y crítica* (Eseoj kaj kritikaro) (1961), ktp; la romanoj: *Wall Street y hambre* (Wall Strato kaj malsato) (19..), *Suetonio Pimienta*, *La ilustre ciudad* (La fama urbo); la membiografio: *La novela de un hombre* (La romano de homo), k. a.

**ORTIZ SANZ, Fernando** (1914-2003). Poeto, verkisto; n. kaj m. en Sucre. Advokato kaj diplomato. Inter liaj verkoj estas: *Prólogo al adiós* (Antaŭparolo al adiaŭo), poemoj (1954); *Cantos a Bolivia* (Kantoj al Bolivio) (1984); *La barricada* (La barikado), romano (1963), k. a.

**OTERO REICHE, Raúl** (1905-1976). Poeto; n. kaj m. en Santa Cruz. Pritraktis temojn de la orienta tropika regiono de Bolivio. Ĉefaj verkoj: *Poemas de sangre y lejania* (Poemoj el sango kaj malproksimeco) (1934), *Flores para deshojar* (Floroj por senfoliigi) (1937), *Fundación de la llanura* (Fondo de la ebenaĵo) (1967), k. a.— Vidu: *Obras completas* (Plena verkaro) (1996. 5 en 6 v.).

**LAYME, Félix.** Ajmara lingvisto. Publikis multajn verketojn pri kaj en ajmara; inter ili: *Literatura aymara: antologio* (Ajmara literaturo: antologio), en kunlaboreco kun Xavier Albó (1992).

**REY-HUDE\_EK, Judita.**— Vd. Hudeček, Judita Rey.

**SALINAS PÉREZ, Rodolfo** (1915- ?). Juristo kaj verkisto; n. en Oruro. Kulturis poezion, teatron kaj ĵurnalismen. Profesoro ĉe la Dekano de la Jura Fakultato de la Oruro Universitato Ĉefaj verkoj: *Manantial* (Fonto), poezioj (1948); *Las hormigas de color* (Koloraj formikoj), rakontoj kaj versaĵoj (1948); *Tu luz y su sombra* (Via lumo kaj ĝia ombro), lirika prozo (1956), *Sinfonía del vivir* (Priviva sinfonio), poemoj (1985), k. a.

**SEKELJ, Tibor** (1912-1988). Vojaĝanto kaj esploranto; elstara verkisto kaj impulsanto de monda Esperanto-movado; organizis kaj kondukis la bolivian esperanto-movadon je ĝia unua epoko (1948-1950). Aŭtoro de multaj libroj pri etnografio, arkeologio, internacia lingvo, k. c., publikitaj en diversaj lingvo, inkluzive esperanto, hispana kaj aliaj; inter ili: *En tierra de indios* (En teroj de indiĝenoj), *Tragedio sur Akonkagvo*, k. c.

**TABOADA TERÁN, Néstor** (1929- ). Romanisto; n. en La Paz. Priskribanto de la popola kaj nasklanda vivo de la okcidenta anda parto de Bolivio. Aŭtoro de multaj verkoj; inter ili: *El precio del estaño* (La prezo de la stano) (1960); *Indios en rebelión* (Indianoj en ribelo) (1968); *Manchay Puyto* (1977); *Ollantay* (1965); kaj la rakonto *El cañón de Punta Grande* (La kanono de Punta Grande) (1997), tradukita al preskaŭ dek lingvoj (eĉ esperanto), k. a.

**TAMAYO, Franz** (1879-1956). Poeto, pensisto, politikisto; n. kaj m. en La Paz. Unu el la ĉefaj reprezentantoj de bolivia kaj hispanamerika modernismo, grava pensisto kaj oratoro. Ĉefaj verkoj: *Odas*

(1898); *Proverbios* (1904-24; 2 v.); *Creación de la pedagogía nacional* (1910); *La Prometheida* (1917); *Nuevos Rubayat* (1927); *Scherzos* (Skercoj) (1932).- Vd. *Obra escogida* (Elektita verkaro) (1978), k. a.

**TARIFA, Guillermo** Mezlerneja instruisto; n. en La Paz; maldekstra sindikata kaj politika kondukisto; militanto en la Komunisma Partio. Partoprenis en la esperanto-grupoj de La Paz je la fino de la 1940-jardeko.

**TUPAJ KATARI** (Julián Apasa) (1750?-1781). Indiĝena ribelanto kontraŭ la hispana subpremo en la anda regiono de Bolivio. Kruelege mortigita de la hispanaj estruloj. Li reprezentas la sinliberigaj celoj de la popolo.

**WALLPARRIMACHI, Juan** (1793?-1814). Keĉua poeto kaj partizano dum la milito por la sendependiĝo de Bolivio. Siaj poemoj, tute verkitaj en keĉua lingvo, estis rekopilitaj kaj disvastigitaj postmorte dank'al laboro de keĉuistoj, ĉefe Samuel Velasco Flor, José Armando Méndez, Jesús Lara k. a.

**ZUBIETA, Magín** (1926- ). Inĝeniero kaj sciencisto; n. en Sudinquisivi (Chuquisaca). Elstaranta ŝakisto. Delegito de UEA en Bolivio dum longa tempo; instruisto kaj divastiganto de la Internacia Lingvo.

\* \* \*

### ALFABETAJ EKIVALENTOJ

La jenaj literoj aŭ kombinoj de literoj de la hispana alfabeto prezentas malsimilojn rilate al esperanto:

c	prononciĝas kiel <b>k</b> antaŭ <i>a, o, u</i> aŭ konsonanto; kaj kiel <b>s</b> antaŭ <i>e, i</i> (en la hispanamerika prononcmannerio).
ch	prononciĝas kiel ĉ.
g	prononciĝas kiel <b>g</b> antaŭ <i>a, o, u</i> aŭ konsonanto; kaj kiel <b>ĥ</b> antaŭ <i>e, i</i> .
gu	prononciĝas kiel <b>g</b> antaŭ <i>e, i</i> .
h	estas muta.
i	prononciĝas kiel <b>i</b> kiam estas sola aŭ portas tildon; kaj kiel <b>j</b> kiam akompanas alian vokalon.
j	prononciĝas kiel ĥ.
ll	ne ekzistas en esperanto; proksimiĝas al <b>lj</b> .
ñ	ne ekzistas en esperanto; proksimiĝas al <b>nj</b> .
q	neniam aperas sola en la hispana; en ajmara kaj keĉua proksimiĝas al <b>k</b> .
qu	prononciĝas kiel <b>k</b> antaŭ <i>e, i</i> (que, qui); kaj kiel <b>kŭa, kŭo</b> antaŭ <i>a, o</i> (quantum, quorum).
r	prononciĝas kiel <b>r</b> kiam estas meze de vokaloj aŭ post konsonantoj malsimilaj al <i>l, n, s</i> ; kaj kiel duobla <b>r</b> ( <b>rr</b> ) kiam estas komence de la vorto aŭ post <i>l, n, s</i> , aŭ kiam aperas kiel duobla <b>r</b> ( <b>rr</b> ).
u	prononciĝas kiel <b>u</b> kiam esta sola aŭ portas tildon; kiel <b>ŭ</b> kiam akompanas alian vokalon; kaj estas muta inter <i>g</i> aŭ <i>q</i> , kaj <i>e</i> aŭ <i>i</i> . (vd. <i>gu, qu</i> ).
w	prononciĝas kiel ŭ.
x	prononciĝas kiel <b>ks</b> ; ajmare havas sonon proksiman al ĥ.
y	prononciĝas kiel <b>j</b> .
z	prononciĝas kiel <b>s</b> (en la hispanamerika prononcmannerio).

La ceteraj literoj: **a, b, d, e, f, k, l, m, n, o, p, s, t, v**, prononciĝas kiel en esperanto.  
En la hispana ne estas la sonoj de *h, ĝ, ĵ* kaj *z*.

### GLOSARO

Mallongiĝoj:

*ajm.* ajmare; en/aŭ ajmara lingvo.  
*bol.* gram. boliviismo.  
*f.* figure.  
*hisp.* hispane, en/aŭ el hispana lingvo.  
*keĉ.* Keĉue; en/aŭ keĉua lingvo.  
*pron.* prononcu.  
*rim.* rimarku.  
*V.* vidu.

– El ordinaraj vortoj

**ajljo, ajljuo** (keĉ. kaj ajm., ayllu): genta socia unueco.  
**ajmaro**: indiĝeno de la andia parto de Bolivio kaj Peru.- ajmara: rilata al kulturo kaj lingvo de *ajmar(an)oj*.  
**alasitas** (ajm.): 1. aĉetu.– 2. Laŭ etendo: festo dum oni aĉet-vendas malgrandaĵojn kaj festigas *Ekekon*.  
**altterejo**, altterajo: hisp. puna.  
**bailecito** (hisp. bailecito, bol.): "danceto" populara de Bolivio.  
**birloĉino**: (hisp. bol. birlocha): virino de malsupra klaso vestiĝanta laŭ riĉmaniero.  
**bretonio**: fajna tuko farita en Bretonio.– Hispane kaj alilingve estas ofta la uzado de kelkaj geografiaj nomoj por signi aĵojn; ekzemple, *jerez* (ŝereo; pron. Ĥerés) = *vino de Jerez*; *Bretaña* (Bretonio; pron. Bretanja) = *lienzo de Bretaña*, ktp.  
**burako** (hisp. buraco, bol.): truaĵo.

**cachet** (franca): fajno, gracia, eleganco. (Eble oni povus esperantigi per "kaŝeto").

**callawaya**.— Vd. kallawaya.

**calle** (pron. kalje, hisp.): strato.

**Cartavio** (pron. Kartavjo): Marko de perua sukero, longtempe importita al Bolivio, je la XX<sup>a</sup>-jarcentmezo.

**ch'alla** (pron. ĉalja; ajm.): ceremonio kie, per drinkado kaj frandaĵoj omaĝe al andaj gedioj, oni komencigas aŭ daŭrigas konstruaĵon aŭ alian faraĵon.

**cholo** (pron. ĉolo): V. ĉolo.

**ch'ujlla** (pron. ĉuhlja; keĉ.): kabaneto, ofte malriĉa.

**chullpa** (pron. ĉulpa; ajm.): mumio.

**ch'ulu** (pron. ĉulu; ajm. kaj keĉ.): indiĝena ĉapo.

**ĉapako** (hisp. chapaco, bol.): , tarija-ano aŭ naskiĝinta en Tarija.

**ĉe** (hisp. che): vi aŭ ci, persona pronomo uzata nur en vokativo.

**ĉolo** (hisp. cholo, bol.): mestizo; ĉolino (hisp. chola): mestizino.

**ĉontao** (hisp. chonta): ligna arbo de la orienta arbaro de Bolivio.

**don** (hisp.): sinjoro, sinjora moŝto.

**doña** (pron. donja; hisp.): sinjorino, sinjorina (aŭ fraŭlina) moŝto.

**Duobla Vo** (hisp. Doble Ve): marko de popola viskio.

**enĉoliĝi (enĉoliĝo)** (hisp. encholarse, encholamiento, bol.): Unuiĝi (unuiĝo) al *ĉolino*.

**fijodalgo** (hisp. arkaismo anstataŭ "hidalgo", hijo-de-algo): hidalgo, filo-de-io, nobelo.

**fortin**, hisp.: fortikaĵeto.

**hilakato** (ajm. jilakata): aŭtoritato de indiĝena grupo.

**huayño**: v. wayño, wayñu.

**indiano, indiĝeno; indianismo, indiĝenismo**. Bolivio, kaj ĝenerale en la anda regiono, estas du vortoj rilataj al indiĝena afero: *indiĝenismo* kaj *indianismo*. Fakte estas malgrandaj kaj subtilaj malsimilecoj inter ili. Unu el tiuj radikas en ke *indigenismo* estis ofte por signali la temaron indiĝenan en literaturo, arto aŭ filozofio, kvankam la vorto *indianismo* estas prefere uzata de la indiĝenoj mem aŭ liaj partianoj, laŭ sociologia kaj antropologia senco. En Esperanto, la vorto *indiĝeno* aludas al aŭtoktona loĝanto de iu ajn lando, kaj *indiano* al la "ano de la ruĝhaŭtaj triboj indiĝenaj en Ameriko" (PIV). Ĉi tiu lasta estas la vorto prefere uzata de Sekelj. (Vd. la tekstoj de Carlos Medinaceli kaj Tibor Sekelj).

**jamake** (ajm.): vulpulo.

**jatirio** (ajm.: yatiri): sorĉisto.

**junglandarbo, junglandujo**: hisp. nogal.

**kallawaya** (hisp. callawaya; ajm. kaj keĉ. kallawaya): etnia grupo de la altebenaĵa bolivia regiono, tre fama pro ĝia sciigo kaj kuracaj artoj.

**kamba** (hisp. camba): loĝanto aŭ, pli bone, deveninto el la orientaj departamentoj de Bolivio.

**kenao** (hisp. quena; keĉ. kaj ajm.: kena): anduja ligna blovinstrumento.

**kesphi** (ajm. pron. kespfi): "unuokula, malforta kaj idiota" (Arguedas).

**kipuso(j)** (hisp. quipu(s); keĉ. kipus): ŝnuroj kunligitaj, uzitaj de la Inkaoj por registri konteblajn kaj statistikajn informojn, kaj eble eĉ por skribi.

**kokao** (hisp. coca): 1. alkala planto de Bolivio kaj Peruo.— 2. ĝia folio, ofte uzata por maĉado kaj por aliaj medicinaj aplikoj.

**kolla** (pron. kolja; ajm. kaj keĉ., kolla; kaj de tio Collao aŭ Kollao, pron. koljao): indiĝena kulturo de la anda bolivia kaj perua regiono, ankaŭ nomita Kollasuyo (pron. Koljasujo).

**majorato** (hisp. mayorazgo): bona nedividebla heredaĵo (Kp. E. Tudela Flores. Vocabulario español-esperanto).

**mallku** (ajm.; pron. maljku): [1] Ĉefa persono aŭ aŭtoritato en socia grupo, preskaŭ kun diaj trajtoj.— [2] f. Kondoro precipe granda kaj/aŭ maljuna, ĉar ĝi estas la plej granda fluganta besto, el kiu venas la frazo *mallku kunturi* (ajm.+hisp.: Cónдор Mallku, aŭ Kondoro "Mallku").

**malvarmaĵo** (hisp. fría, helada, bol.): malvarmega biero.

**mamsuĉi** (hisp. *mamar*, bol. vulgara): trompigi.

**mikstlio** (hisp. mixtli): sovaĝa besto.

**molinosisto** (hisp.): partiano de la molinosismo, hereza doktrino de la hispano Manuel de los Molinos (1628-1696).

**oidoro** (hisp. oidor): Ministro aŭ juĝisto, kiu decidis pri procesoj kaj pledoj.

**okao** (keĉ. oka, uka; hisp. oca): altebenaĵa planto, kies cilindraj radikoj estas manĝeblaj.

**Pachamama** (pron. paĉamama; ajm.): tero-patrino.

**pahuichi** (pron. paŭiĉi, hisp., bol.): malgranda kaj malriĉa kabaneto, en la orienta regiono de Bolivio.

**palobobo** (hisp.). Grandega arbo, el la ĉaka regiono.

**pallasiri** (keĉ.; pr. paljasiri; hisp. recolector): rikoltanto.

**patrinum(in)o** (ajm. mamakuna): kunulino kaj patrino de la gefiloj.

**pila'** (hisp.: pilo): kromnomo de paragvajanoj, donita de bolivianoj dum la Ĉaka Milito.

**pseudomorfortika** (hispane, pseudomorfótico): neologismo uzata de Medinaceli en sia eseo pri indianismo, laŭ la signifo de *false forma*.

**pun(o)ano**: ĉi tie, el Puno(o), perua suda provinco.

**pututo**, (ajm. kaj keĉ. pututu): ventmuzikilo el bova korno.

**quebracho** (pron. kebraĉo; hisp.): en la ĉaka regiono, arbo el tre malmola ligno.

**rekoleta**: [1] (hisp. recoleta), monaĥo kiu gvardas reguloj pli strikte ol alia.— [2] (hisp. recoleta); preĝejo de ĉi tiuj monaĥoj.

**roskao** (hisp. bol. *rosca*): homrondo, socia prarevolucia klaso de terhavantaj kaj minprenantaj riĉeguloj.

**rubendariano**: simpatiulo aŭ sekvanto de la nikaragva poeto Rubén Darío, elstara reprezentanto de la hispanlingva modernismo.

**salesano** (hisp. *salesiano*): religiulo de la ordono de Sankta Francisko de Sales.

**samiri** (ajm.): ripozejo.

**savano** (hisp. sabana, *Amer.*): ebenaĵo. (Kp. Tudela Flores).

**sic** (lat.): tiele, laŭtekste.

**singanio** (el hisp. *singani*): bolivia populara drinkaĵo.

**ulupica** (pron. *ulupika*): forta frukteto uzata kiel pikmanĝaĵo.

**ŭajŭjo** (ajm. kaj keĉ.): v. *wajño*.

**versallismo**: ismo rilata al Versailles, fama franca palaco.

**vikuno(j)** (hisp. *vicuña*): nacieta fakcio de Potosí, formita el kreoloj, kies kromnomo devenis de la uzado de vikuna mantelo el lano de vikuno. Ili subtenis longan bataladon (precipe dum la XVII<sup>a</sup> jarcento), kun la naciefakcio de *vaskoj*, elvenintaj el Vaskio.

**virakoĉ'o** (ajm. kaj keĉua, wiraqocha): grava eminentulo en anda kampara socio.

**wayño, wayñu** (hisp.; el ajm. kaj keĉ.; pron. *ŭajnjo, ŭajnju*): anduja kaj speciale bolivia folkloro melodio, plenritma sed trista.

**yatiri** (ajm.): v. *yatirio*.

**yenda**: (hisp. *yenda, hienda*): (long)fendeto. (En la Vortaro de la Hispana Akademio, aperas kiel *hienda*).

#### – El geografiaj, personaj kaj aliaj propraj nomoj.

**Achakachi, Jach'akachi** (ajm.; pron. *Aĉakaĉi, Ĥaĉakaĉi*): laŭlitere, Granda Pinto, hisp. Punta Grande; nomo de vilaĝo en departemento La Paz.

**Agiali** (ajm.): propra vira nomo.

**Aguarrica** (hisp.): laŭlitere "bongusta <delica> akvo". (En la rakonto *La paragvajino*: loka nomo en la Ĉaka regiono).

**Apis** (latin.): egipta diulo, laŭ bova formo, protektanta de sia popolo. [En la eseo de Medinaceli aperas kiel *Apus*].

**Asunción**: ĉefurbo de Paragvajo.

**Beni**: departemento en la orienta regiono de Bolivio.

**Boquerón** (pron. *bokerón*, hisp.): engraŭlo.— Nomo de fama loko kie okazis unu el la ĉefaj bataloj dum la Ĉaka milito.

**Calamarca** (pron. *Kalamarka*): altebenaja loko, kie estis murditaj ofcistoj de la ŝtata mineja entrepreno, kiuj alportadis monon por la salajro de la minlaborantoj.

**Calacoto** (pron. *Kalakoto*): regiono proksima a La-Paz-urbo; nun kvartalo de la sama urbo.

**Carlos** (hisp., pron. *Karlos*): Karlo, propra persona nomo.

**Chabel(it)a** (hisp., pron. *Ĉabel(it)a*): karesema nomo de Isabel (Eli(zi)nja: Elizabeta).

**Chaco** (pron. *Ĉako*; hisp.): v. *Ĉako*.

**Chela** (pron. *Ĉela*): karesema nomo de Graciela (pron. *Grasiela*) = Gracia, Graciema. (Ĉu eble *Granja?*).

**Chiquitos** (pron. *Ĉikitos*). Unu el la orientaj kaj tropikaj regionoj de Bolivio.

**Chuquisaca** (pron. *Ĉukisaka*), departemento de Bolivio, kaj per etendo, ĝia ĉefurbo.

**Cochabamba** (pron. *Koĉabamba*). 1. Centro-regiona departemento de Bolivio. 2. Ĝia ĉefurbo.

**Cólquida** (pron. *Kólkida*): vd. *Kolkido*.

**Cuscurrita** (pron. *Kuskurrita*): familnomo.

**Ĉako** (hisp. *Chaco*): vasta tropika regiono, kiu kovras partojn el Bolivio, Paragvajo kaj Argentino, kie lokiĝis milito inter Bolivio kaj Paragvajo.

**Ekeko** (ajm.): malgranda diulo de la abundeco kaj la vivĝojo, en la ajmara etnio.

**Enrique** (hisp. pron. *Enrike*): Henriko, propra persona nomo.

**Frato Justo** (hisp. *Fray Justo*, pron. *Fraj Ĥusto*), laŭ litere: Frato Justa; religia nomo de unu el la ĉefroluloj de la romano "Juan de la Rosa".

**Guachalla** (pron. *Güaĉalja*): familnomo de fama bolivia politikisto (Luis Fernando Guachalla), per kies nomon oni donis al fortikaĵon en Ĉako.

**Illimani**: unu el la plej altaj eternaneĝaj montoj de la bolivia Andujo.

**Jach'akachi**. V.: Achakachi.

**Koĉabamba**: vd. *Cochabamba*.

**Kolkido** (hisp. *Cólquida*). Antikva regiono ĉe S. E. de la Nigra-Mara bordo.

**La Paz**: 1. nord-okcidenta departemento de Bolivio. 2. Ĝia ĉefurbo estas sidejo de la landa registaro.

**Lola**: karesema nomo de Dolores (= Doloroj).

**MNR** = *Movimiento Nacionalista Revolucionario*: Naciisma Revolucia Movado, politika partio, kiu regis Bolivion je multaj periodoj kaj kondukis revolucion de 1952.

**Nanawa**: armea posteno en ĉaka regiono, kie okazis grava batalo.

**Oruro**: 1. anda departemento de Bolivio.— 2. Ĝia ĉefurbo.

**Oropesa** (hisp.): unu el la nomoj de urbo Cochabamba; aludas al la nobeltitolo de la Grafo de Oropesa, kiun portis Francisco de Toledo, la vicreĝo de Peruo, kiu ordonis fondi la urbon.

**Pacajes** (pron. *Pakáĥes*): provinco de La Paz.

**Paucara** (ajm.): familnomo en la ajmara grupo.

**Pedro** (hisp.): Petro, propra persona nomo.

**Potosí**. 1. Fama monto en la anda montaro de Bolivio.— 2. Departemento de tiu respubliko.— Ĝia ĉefurbo.

**Punata**: provinco de la departemento Cochabamba.

**Taunqap** (aŭ **Thunupa**): nomoj de diaj kaj/aŭ sanktaj estuloj de ajmaraj indiĝenoj.

**Teresa** (hisp.): Tereza, propra ina persona nomo.

**Thunupa**. V. *Taunqap*.

**Tiwanaku**: 1. Prahistoria kulturo de la Anda regiono.— 2. Loko kie nun troviĝas la arkeologan restaĵoj de tia kulturo. (Sekelaj transliteras per *Tiaŭanako*).

**Toñ(it)a** (pron. *Tonĵita*): karesema nomo de Antonia (=Antona).

**Tupaj Katari** (pron. *Túpaĥ Katari*): indiana heroo de la ribelo kontraŭ la hispana superreĝo. (Kp. noto sub la parolado de Jenaro Flores).

**Viacha** (pron. *Vjaĉa*): kampara vilaĝo proksime al La-Paz-urbo, en la samnoma departemento.